## Demandoj pri la rakonto:

1. Kial estis avertaj raketoj sur la ŝipo?
2. Kio staris apud la raketoj? Kiel ĝi alvenis tien?
3. Kial la raketoj supren foriris? Kiel ili supren foriris?
4. Super kio flugis la raketoj?
5. Kien falis unu raketo? Kion ĝi frapis? Kie ĝi eksplodis?
6. Kiom da raketoj ankoraŭ alvenis kaj eksplodis?
7. Kio vekis la profesoron?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Estas danĝere:*

1. Kial estas danĝere meti petrolon apud avertajn raketojn?
2. Kial estas danĝere pikniki en la mezo de Aŭstralio?
3. Kial estas danĝere transiri la aŭtovojon en Ateno aŭ Teherano aŭ Tokio aŭ Parizo aŭ Romo aŭ Singapuro aŭ Londono aŭ...
4. Kial estas malfacile esti alpisto en Nederlando?
5. Kial estas malfacile esti ŝipestro en Tibeto?
6. Kial estas malfacile esti vendisto de fridujoj en Gronlando?
7. Kial estas danĝere salti de altega ponto kun ligitaj manoj, kun piedoj ĉenitaj al peza betona bloko, sur kiu siblas venena serpento en venenan akvon, en kiu svarmas ŝarkoj, piranjoj kaj krokodiloj?
8. Kial estis danĝere loĝi en Pompeii antaŭ miloj da jaroj?
9. Kial estis danĝere loĝi en Londono inter 1660 kaj 1670?
10. En kiuj lokoj estis danĝere loĝi inter 1940 kaj 1945?...inter 1946 kaj 1955?...inter 1956 kaj 1965? ...inter 1966 kaj 1975?
11. En kiuj lokoj estas danĝere loĝi nun?



## Ekzerco transformiga:

Jen frazoj kun la formo: subjekto, verbo, prepozicia komplemento. Transformu la frazojn. Uzu la saman subjekton. Uzu la verbon, kiu staras inter la krampoj. Ĝi estas transitiva verbo kaj bezonas objekton kun la finaĵo -n. Kreu la objekton el la substantivo en la prepozicia komplemento. Vi ne plu bezonos la originalan verbon kaj prepozicion.

*Ekzemple:*

La profesoro paŝis al la pordo. (malfermis)
La profesoro malfermis la pordon.

1. La vendisto venis kun vekhorloĝoj. (vendas)
2. La profesoro interesiĝas pri vekhorloĝoj. (ne havas)
3. La vendisto parolis pri la vekhorloĝo. (donacis)
4. La koko flugis apud la terura lokomotivo. (rigardis)
5. La sonorilo falis al la telefono. (frapis)
6. La trajno foriris de la stacidomo. (forlasis)
7. La stacidomestro kuris post la trajno. (volis haltigi)
8. La subŝipestro kuris al la malalta viro. (helpis)
9. La edzo kaj edzino kuris inter la paperoj. (levis)
10. Lev kuris al la telefono. (respondis)
11. La pontestro pensis pri sia libro. (serĉis)
12. La paperoj kuŝis sur la tuta tablo. (kovris)
13. La ŝipestro timis pri grandaj problemoj. (havas)
14. La ŝipestro parolis al Lo Zaklap. (pridemandis)
15. La lasta cilindro venas al la holdo. (ne eniros)
16. La pontestro laboras ĉe la ponto. (mallevos)
17. La trajno venis al la ponto. (transiris)
18. La observisto ne atentis pri la ponto. (ne vidis)
19. La ponto troviĝis apud la masto kaj la observisto. (frapis)
20. La fajro venis al la raketoj. (atingis)
21. La raketoj falis al la fenestro. (frapis)

22. La raketoj eksplodis apud la profesoro. (vekis)
23. Ĉu la profesoro kontentos pri la vekhorloĝo? (aĉetos)

## Kaj ankoraŭ io...

*Verku mallongan rakonton pri almenaŭ unu el la jenaj temoj:*

1. Kiel oni inventis la unuan vekhorloĝon (aŭ raketon, aŭ levponton … sonorilon).
2. Unu tago en la vivo de vekhorloĝo (aŭ ŝipo, aŭ kato, aŭ vendisto, … lokomotivo, aŭ levponto, aŭ raketo, aŭ...).

**Ĉapitro dek unu: La vendisto revenas**

## Demandoj pri la rakonto:

1. Kiu revenis? Kial li revenis? En kiu ĉapitro li unuafoje venis?
2. Kion diris la profesoro al la persono, kiu venis?
3. En kia stato estis la dormo-ĉambro? Kial ĝi estis en tia stato?
4. Ĉu la profesoro estis malkontenta pri la stato de la dormo-ĉambro?
5. Kial la profesoro aĉetis la vekhorloĝon?
6. Ĉu vere la vekhorloĝo vekis la profesoron?

## Demandoj ne pri la rakonto:

*Mirinda:*

1. Ĉu via vekhorloĝo estas mirinda?
2. Kiuj maŝinoj estas laŭ vi mirindaj?
3. Kiuj personoj estas laŭ vi mirindaj? Kiuj bestoj?
4. Ĉu maŝinoj estas pli mirindaj ol homoj?
5. Kiuj lokoj, landoj aŭ scenoj estas mirindaj?
6. Kiuj konstruaĵoj aŭ skulptaĵoj estas mirindaj?



7. Kiuj transportiloj estas mirindaj?
8. Kiuj poemoj, romanoj aŭ skribaj verkoj estas mirindaj?
9. Kiuj pentraĵoj, muzikverkoj aŭ teatraj spektakloj estas mirindaj?
10. Ĉu ĉio, kio estas mirinda, estas bona?

## Ekzerco dek kaj ala:

*Kompletigu ĉi tiujn frazojn pri la rakonto:*

1. La trajno iris de ................ al la ....................
2. La observisto falis de ................ al la ....................
3. La kato falis de................. al la ....................
4. La ŝipestro telefonis de.............. al la ....................
5. La koko flugis de ............... al la ....................
6. La ŝipo iris de .............. al la ....................
7. La subŝipestro flugis de ................ al la .................
8. La raketo flugis de ......... al la ......................

